

# PLATANO

## SEMO!



Sen  
Motivo



# 1. Kiel Gangstero (Gaste Eterne Rima)

Muziko pruntita de Mopp Deep

Freestyle sen skribil' Povo de la flor' el pistil'  
Rep' de hipio Rekte el Francio  
Hipi-yo hipi-yeah donu la mikrofonon  
Mi historias kiel dr.Dre  
M.D.F.ka... Koktelas kiel molotova  
Pri kio temas? Kial timon havas?  
Reflekso via kaŝi tro malbonas  
Mi vin sekvas kaj ..blah kapon tuj frapas  
Kvazaŭ polic' sen iu ajn komplic'  
Kiel anteno parabola, mi neniam agas sola  
Ĉar mi paranojas. Putin' kiel la Toya  
Min fuŝlekas ..tsss' vi duŝon bezonas  
Monon tuj prenas kaj ĉion ludas  
Kaj ĉion perdas, kion vi konkludas  
Militon al vi deklaras eĉ se mi ne povas  
Eĉ se mi ne povas... blah

Kantreveno:

Ni venos je malantaŭa pord' kiel gangstero  
Dum UK ŝtelos mikrofonon dum la Espero  
Mi rompos silenton sur plank' restos vitrero  
Skandal' en Kongres', reprezentas mizeron (2x)

Eterne Rima :

Espistoj mi ne ŝatas internan bataladon sed fek  
Mi amariĝis ĉar mi havas kaŭzon dek'  
Aŭ eĉ pli ek' mi prenas elektitan verson, blek'  
En la mondo venas nova sento  
Rekte de Star Trek. Vi nomu min Klingon'  
Bone, mi ne ludos kun vi ping-gong'  
Sed amiko mia en Pariz' kun la mikrofon'  
Sentas same, ni bruegos en espo-zon'  
Rigardu min kaj sciu, en mi sidas la koler'  
Ĝi kumuliĝas jam delonge, kruela ver'  
Vortoj vane mi ne ĵetas, mi ne diskretas  
Mondo ŝuldas ion al mi, sed mi ne petas mi nur agas  
Kaj jes mi malamas. Al putinidoj ne pardonas  
Ne gravas ĉu mi famas, Estas vortoj de honor'  
Jen ĉio kaj nenio pli. Fek' simplegas tiu filizofi'

## 2. Low.Geek.o

Muziko pruntita de intereto « Instru Elektro »

Kaptu la mikrofonon kvazaŭ unua am'  
Tomba ŝtono por vi: via lasta dram'  
Mi perdis energion, pli ol dum l'unua foj'  
Vi estas eta hundo nur aŭdeblas via boj'  
Projekto estis reveni al okdekaj jaroj  
Luiĝi kaj Mario la savanta paro  
Mi manĝas la blankan ĉampinjonon  
Grandiĝas kaj tuj iĝas la ĉampiono  
Malfermu ĉampanon en ĉiuj urb-kamparoj  
Fosas grundon, rompas muron, ramparon  
Ili forgesis mian magian pocion  
Drinkas ĝin por gajni ĉiujn opciojn  
Katana' por murdi finan estron  
Li tuj komprenu: kiu estas la majstro  
Etaj monstroj iras el lia buŝo  
Sed kiel diris Cirano: «je fin' mi tuŝas»

Bum bap bum bap'  
Viv' ne estas ludo  
Bum bap Bum bap'  
Ĉu vi komrenas mia aludo?  
Serĉu vian ekvilibro?

L'ret' forta dorg' oh  
Devas mi halti morgaŭ  
Ĉesi plenigi dosierojn de guglo  
Rigardu lastan libron foriri en fumo  
Facile ni iĝas de faŝism' komplicoj  
Eliru rapide for' de la senkoncio  
Demando: Kie estas la vera progreso?  
Kaj Kial do maleblus la ĉeso  
Ĝenerala prifajfado en komutilemo  
Ĉu eraro estas en nia sistemo?  
Inter-insultas sin la mond'  
Ekstremism' en familia rond'  
Jutub': katalizilo de nia viv'  
Malam' kvazaŭ GazaTelAviv'  
Sed kiel Kimo «tute ne gravas»  
Kiu laste parolas tiu-ĉi pravas...  
Vizaĝlibro la plej ruza diktatoro  
Malnova film' kun fi-fama aktoro

Kantreveno

### **3. Levu la manon** **Muziko pruntita de Necro**

Dum promenad', ĉe fest', aŭ ĉe laborejo  
Refari kion faris Soljenistein' en Kelo  
Parkerigi tekstojn, konstrui etajn mantrojn  
Ludi poemiston kvazaŭ estus arto  
Kiam eblas kuŝi ĉion al blanka paĝo  
Resti sur nuaĝ' ĝis ekstaras repaĵo  
Rekopii milfoje, denove elektronike  
Ŝalti mikrofonon kaj «loudspeaker» re  
Prilabori denove vortharmonion  
Rememoru bonan tempon de pioniro  
Restu ĉe la ritmo: unu, du, tri, kvar  
Okuloj al papero – vidi kion sekvas  
Kaj se vi ne ŝatas, ne vere gravas  
Neniu aŭskultas, verdire vi pravas  
Mi ne memoras pri rest' de l' teksto  
Mi pensis pri tiu kantreven : testo

Kantreveno:

Ĉiuj, ĉiuj levu la manon  
Rep' fluas kvazaŭ malferma krano  
Ĉiuj, ĉiuj levu la manon  
Ĉi-tie pro vi repas la Platano (2x)

Iom pli da son', iom pli da alkoholo  
Kune kun skoch' reprezentas malnovan skolon  
Frakasa sonbat' rompos vian kolon  
Mi neniam respektis ilian protokolon

Pikaj rimoj surpapere  
Diamentoj eĉ brilas subrivere  
Konsentite, mi ne estas Wiliam Auld  
Facile de akademi' povas ili aŭdi  
Sed mi repas laŭ tradicia stil'  
Same kiel por la dub' Chaka Demus & Pliers  
Revenas al la fonto kiel metodist'  
Amik' desegnis ion por tiu eta disk'  
subgrunda gangstera labor', kuzoj  
Plua pruvo por estontaj akuzoj  
Nova bona KoDo por EO-merkato  
Ĝuste sub sun'. Kie dormas la kato

Ne, vi ne scias al kio mia stil' similas  
Kaj se vi sciu, sciu ke ĉiuj min imitas  
Do mi tiras linion inter mi kaj malvero  
Frapas kalkan', ĵetas en aer' polveron  
Mi nur senlimigas eblecon de la homaro  
Kompano, mi ne pagos krompagon  
Male mi ŝtelos moneron de la kaso  
Mi nur uzas mian kapablon kiel Picasso  
Vi nur uzu vian buŝon por diri ion  
Vortojn miajn eniros kapojn eĉ sen glitilo  
Mekanike paniku, pafklikas la metodo  
Dank'al kio espo-rep' nuntempe eksplodas?  
Dank'al al vi kaj ĉiuj kiuj subtenas  
Ne venkeblas kiam mikrofonon tenas  
Mi kaj ĝi brilas dum oni nin lumigas  
Sed post lum' verdire mi humilas

#### 4. « **Bonjour Monique !** »

Muziko pruntita de Pete Rock & CL Smooth - Dialogo de jutubo

- Bonjour, Monique ! - Bonjour, Nicole !
- Est-ce que vous êtes en France aujourd'hui ?
- Ah non, je suis en Australie /.. je suis en Australie
- Pourquoi êtes-vous venu en Australie ?
- Pour diverses raisons mais la première c'est à cause de la langue que je parle...
- Quel langage parlez-vous ? Le français ?
- Alors, je préfère parler en espéranto car les amis qui m'accueillent sont des espérantistes
- Bonjour, Monique ! - Bonjour, Nicole ! (...)
- Pourquoi ? C'est quand même une langue artificielle !
- Ah non, je suis en Australie

Traduko :

- Saluton, Monique ! - Saluton, Nicole !
- Ĉu vi estas en Francio hodiaŭ?
- Ah ne, mi estas en Aŭstralio /.. mi estas en Aŭstralio
- Kial vi venis en Aŭstralio ?
- Pro diversaj kialoj sed unue pro la lingvon kiun mi parolas ?
- Kiun lingvon parolas vi ? La franca ?
- Nu, mi preferas paroli en Esperanto ĉar la amikoj kiu gastigas min esperantistas.
- Saluton, Monique ! - Saluton, Nicole ! (...)
- Kial? Tamen, estas artefarita lingvo !
- Ah ne, mi estas en Aŭstralio



## 5. Papapa...

Muziko pruntita de Aphanty

Jes ja, jes ja denove revenas  
Sencele, tiel tio dependas  
Ne de vi. Ne, vi ne ekzistas  
Fantomo kiu ĉiam insistas  
De retejo al retejo  
Vi virtualas, mi realas  
Paĉjo, pastro, papo, papaplatano  
El la grupo Pafklik'  
Ĉio devis iĝi plastik'  
tik tik boom badabom  
Eksplozas je instrumentaro  
Mi nur ĵetas iom da oleo en fajron  
fafafaru kion vi volas  
Mi duras dum vivo malmolas  
vi ne ŝatas, al mi plaĉas  
vi silentas, mi parolas

Estas la P.L.A.T.A.N. : unuvorte Platano  
Revenas ĉiu jaron ĉiu monaton  
Mikrofon' en la M.A.N.  
De la vespero ĝis la frumateno

Ĉikitibam revenas en fundamenta slang'  
Ekcitiĝas popolo per mia vigl-vigl-vigla lang'  
Kara, aŭskultu konsilon de veterano  
Ĉarma princo ne eliros de eta rano  
Realec' kaŝiĝas malantaŭ ekrano  
Neniam glutu la veron de la estraro  
Ĉiam je la serĉado de vera vivo  
La temo : sen motive

## 6. Epilogo

### Muziko prunĵita de Evidence

Kvazaŭ Repi, galvo sub la groĝo

Mi malamita de esperantio. Kiel de la Mond' Bush Ĝiorĝo

Mi volus fari pli ol tio. Ne plu povas, sen forto

Mi nur atendas mian morton

Neniam kortuŝa, apenaŭ kompatinda

Neniam fidinda. Nu, ĉiam fidela

Sed al malbona sorto. En mia kap' maltez' Korto

Kaj lia vojaĝo. Tra mirinda peizaĝo

Bonvenon en nia mond'. Plene de milit' kaj bomb'

Vivo estas sak' de bombono. Neniam scias ĉu fuŝ' aŭ bono

Sango ĉe la buŝ' kiel vampiro. Neniu baldaŭ povus min sopiri

Iri denove al labor'. Sen ĝemi sen plori

Konservi doloron ĉe intestino. Estas mia vera destino

Mi doloras kaj mi pentas. Mi vomas kiel mi repas

Ne kuracil' nur morfino. Jen skribil tuŝis punkton finon

For' de kor' kaj de memoro

Kiom da Heroo ses pideoj sub tero? (2x)

Ne plu da malsat' nek da streĉ' je stomako

Jes finfine libero venis post koratako

Ne plu sentas la haŭto, foriris urtiko

Ne plu zorgas pri vetero aŭ politiko

Ne skribas plu, senerare iras sintakso

Ili ne plu tedigos min per faks' aŭ tasko

Nek' ŝatis mia viv', nek ilia socia muldo

Do foriras trankvil' kun grandega ŝuldo

Por mia dom' nur kvar' tabuloj por ĉiam'

Neniu por la am', eĉ ne por la malam'

Najbaroj mi ne konas ne volas koni

Prifajfis pri la mi, imagu iom pri la oni

Neniu vizit' krom famili' kun flor' por ornamo

mortis mi ... kaj finfine povas dormi

## [ Free-Mixtape PK-Prod.2013 ]

### **Dankon al :**

- Alex Kadhavali kiu desegnis kd-kovrilon
- Korektoj : Diana, Flo Martorel, Ricardo Cash
- Helpis pri mikso kaj majstrigado : Melono
- Eterne Rima (« Kiel Gangstero »)
- Monique (« Interkanto »)

Por aliaj senpagajoj iru tien:  
[hiphopesperanto.blogspot.fr](http://hiphopesperanto.blogspot.fr)

En 2014, se ni havas sufiĉe da promesoj aperos 1a albumo de Platano.  
Por subteni tiun projekton vi povas promesi la aĉetado de tiun diskon.  
<http://goo.gl/5pvMO>

Ankaŭ eblas aĉeti diskon de la Pafklik kaj Hiphopa Kompilo vol. 2  
[www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com)  
[www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com)

[lapafklik.ipernity.com](http://lapafklik.ipernity.com)  
[www.facebook.com/platanopalatano](http://www.facebook.com/platanopalatano)  
[twitter.com/LaPafklik](https://twitter.com/LaPafklik)

Ne forgesu aŭski radiojn :  
[muzaiko.info](http://muzaiko.info) (tuttempa ekde 2 jaroj)  
[podkasto.net](http://podkasto.net) (Varsovia Vento)

# SEMO - Sen Motivo

1. Kiel Gangstero (gaste Eterne Rima) 2:3
2. Low.Geek.o 2:16
3. Levu la manon 2:55
4. « Bonjour Monique ! » (interkanto) 1:15
5. Papapa... 2:01
6. Epilogo 2:16

